

## LA MIRINDA LIBRO

Diversaj aŭtoroj. Eldonis Barcelona Esperanto-Centro, 1984-a

21 x 14,5 cm. Prezo: 300 pesetoj. ISBN 84 398 1654 5.

Mendebila ĉe Libro-Servo de H.E.F.

Antaŭ miaj okuloj, de kiam mi ekkonis persone s-anon Ramón Molera, mi ĉiam vidis lin kiel maturan personon - ne pro liaj fizikaj aŭ vizaĝaj trajtoj kiuj ĉiam estis tiuj de viro plena je fortienco kaj farto enviindaj, sed pro liaj celtrafaj decidoj pri entreprenemaj agadoj, aplombo antaŭ ĉio kaj vigleco konstanta. Sed kiam, pro la nehaltigebla forpaso de la jaroj li iom post iom fariĝis vere maturaĝa, mi nur vidis en li aspekton de enviinda stagna juneco, malgraŭ ke lastatempe kelkaj faltoj aperis sur lia vizaĝo, eble pro la malsano kiu subfosadis pli-malpli rapide lian valoran aktivan vivon.

Lia afableco, kaj lia ĉiam ridetante simpatiemio enkadrigita en vizaĝo serene altira kaj nekonfuzebila, spegulis talentan personon kiu tute donis sin al siaj profesio, familio, amikaro kaj plej noblaj idealoj. Esperanto estis por li, laŭ pluraj facetoj, senlima agadkampo por ke lia «bonhomo» («bonhomia», en kataluna lingvo) efiku tre valide por esti konstanta varbanto kaj propagandanto —propagandisto— de la Zamenhofa idealo.

En Moia, la iutempe «verda urbeto», pro lia efika kaj konstanta esperantigo de multnombra junularo - la tuta loĝantaro admiris kaj amis s-ron Molera. Kaj kiam li, kiel posteulo de Delfi Dalmau prenis lian torĉon en la responsa grava posteno de hispana ĉefdelegito de U.E.A., li malvolvis plej efikan entuziasman agadon kaj baldaŭ li gajnis la Internacian Konkurson pri almembrigado. Jen, do, modela homo al kiu tiu presaĵo «La Mirinda Libro», prezentas modestan sed sinceran postmortan omaĝon al li, profitante la okazon de la 75-a datrevena jubileo de la Universala Esperanto-Asocio.

Jen 65-paĝa eldonaĵo konsistanta, precipe, el verketoj premiitaj en la Internacia Literatura Konkurso «Ramón Molera», kiun Barcelona Esperanto-Centro alvokis okaze de lia frua forpaso, por tiel reliefigi la taskon ĉefdelegitan kiun li plenumis. Kiel dirite, tiel efike. La premiitaj noveletoj ne estas. laŭ absoluta literatura aspekto, tre altvaloraj, tamen ĉiu indas kaj altiras sprite kaj gaje, kaj pro formala korekteco, nian atenton kaj ŝaton. Pruviĝas, do, ke ne estas necese ke ĉiu teksto estu stile majstraĵo por ke ĝi, ordinare, estu plenefika kaj vere valida laŭcele.

«La mirinda libro» estas ankaŭ la titolo de enlibra rakonta spertaĵo kiun, kiel valora atestaĵo, verkis L. Serrano Pérez. Kaj la filino de la omaĝito, Anna M. Molera, la tre efika kaj konstanta helpantino de sia patro, per emociaj rememoraĵoj vortoj ankaŭ portretas la fidon kaj la bonkorecon de tiu, kiun ni ĉiuj priploras.

Jen modesta libreto, i.a., laŭ aspekto beletra, al kiu ni diras «Bonvenon!».

G. Mora i Arana